

Jubilea eldono

## MAGAZINO

Antaŭa nomo: La Libera Esperantisto

Organo de Libera Esperanto-Asocio / Germanio (LEA/G)  
Membro de LEA-Komitato de S.A.T. Paris  
Organ des Freien Esperanto-Bundes in Deutschland

## L.E.A./G. en INTERNET

En la lastaj numeroj de la S.A.T.-organo SENNACIULO vi povis legi\*, karaj legant(in)oj, pri la evoluo de S.A.T.-paĝoj en la internacia komunik-reto. Tiuj el vi, kiuj havas eblecon konsulti la paĝojn bonvolu tion fari kaj nepre kritiki al via asocio LEA/G por plibonigi ilin. S.A.T. jam enmetis paĝojn de tri LEA-grupoj: SAT-Amikaro (Francio), Sveda Laborista Esperanto-Asocio kaj Germana Libera Esperanto-Asocio (LEA/G). La informoj aperas en la koncernaj landaj lingvoj. Pri la germanlingva LEA/G-teksto bv. legi paĝon 2 de tiu-ĉi MAGAZINO. Jen la traduko:

\*Depende laborantaj esperantistoj fondis en la jaro 1911 la unuiĝon >Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) <. Malsameco de opinioj inter membroj de la social-demokrata kaj la komunista tendencoj pro la orientado de la lastaj al la soveta komunismo influis la evoluon de GLEA; en 1930 fondis socialdemokrataj membroj Esperanto-grupon >Socialista Esperanto-Asocio (SEA) <.

Post la dua mondmilito la Germana Esperanto-Asocio, al kies nova fondo laboristaj esperantistoj aktive kunlaboris, devoligis sin por neŭtraleco koncerne la Esperanto-Mond-organizaĵojn U.E.A. kaj S.A.T. Tiu neŭtraleco estis ofendita, ĉar G.E.A. en 1955 aliĝis al U.E.A. Sekve de tio ĝenerale socialdemokrataj Esperanto-amikoj fondis la >Libera-n Esperanto-Asociacion < dum pasko 1956. Ili rezoluciis por kunlaboro en S.A.T.

LEA/G konigas la internacian lingvon Esperanto al la germanlingvaj popoloj. Kursoj malfermas al la finintoj la eblecon, kontaktigi internacie de homo al homo. Tio servas al sennacia pensmaniero kaj inter popoloj komprenon. LEA/G malakceptas ĉiun diktaturon kaj trovas en evoluo de la popoloj al demokrata, humana, liberala kaj sociala socio la bazon por sia aktiveco. LEA/G eldonas kvaronjare sian organon MAGAZINO, kies enhavo (parte dulingva) informas kaj i.a. prezentas Esperanto-kurson.

La taskoj estas financataj per kotizoj kaj donacoj, kiujn pagas membroj kaj subtenantoj. Ĉiu povas aliĝi kaj aktive kunlabori, kiu akceptas la LEA/G-Statuton; kiel pasivaj membroj povas aliĝi personoj kaj organizaĵoj, kiuj akcelas la ideon de Popolinterkompreno kaj finance subtenas LEA/G. La demokrate elektita estraro (5 membroj) laboras en interkonsento kun konsilantoj. La 1-a Prezidanto reprezentas LEA/G interne kaj eksteren.

Albert Stephan (1-a Prezidanto)

*Literaturo:* Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado (Fritz-Hüser-Institut, Dortmund)  
Zur Geschichte des Arbeiter-Esperanto-Bundes... (Ino Kulbe, Leipzig)  
*Klarigoj:* S.A.T. - Sennacieca Asocio Tutmonda, sidejo Paris (Monda asocio de laboristaj esperantistoj); U.E.A. - Universala Esperanto-Asocio



FREIER ESPERANTO-BUND für deutschsprachige Gebiete  
(Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj - LEA/G)  
Sitz: Oberkirch (Baden)

Esperanto-Anhänger aus den Kreisen abhängig Arbeitender gründeten 1911 den Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bund (Germana Laborista Esperanto-Asocio - GLEA). Meinungsverschiedenheiten zwischen Mitgliedern der sozialdemokratischen und der kommunistischen Richtung wegen der Orientierung der Letzteren zum sowjetischen Kommunismus beeinflussten die Entwicklung des Bundes (GLEA); 1930 gründeten sozialdemokratische Mitglieder den Sozialistischen Esperanto-Bund (SEA). 1933 nach der Machtergreifung durch die Nationalsozialisten wurden die beiden deutschen Arbeiter-Esperanto-Vereinigungen zerschlagen. (Literatur: Illustrierte Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung - 1993 - Herausgeber: Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiterliteratur, Stadt Dortmund)

Nach dem 2. Weltkrieg verpflichtete sich der vor allem auch von Arbeiter-Esperantisten neugegründete Deutsche-Esperanto-Bund zur Neutralität hinsichtlich der Esperanto-Weltorganisationen UEA und S.A.T. (Weltbund der Arbeiter-Esperantisten); die jedoch durch Kollektiv-Beitritt zur UEA 1955 verletzt wurde. Daraufhin gründeten Ostern 1956 vor allem sozialdemokratisch orientierte Esperanto-Freunde den Freien Esperanto-Bund (LEA/G). Es wurde beschlossen, mit S.A.T. zusammenzuarbeiten.

Der Bund (LEA/G) macht die internationale Sprache Esperanto in den breitesten Bevölkerungsschichten bekannt. Lehrgänge für Esperanto sollen den Absolventen die Möglichkeit eröffnen, international direkte Verbindungen von Mensch zu Mensch anzuknüpfen, womit einer übernationalen Gesinnung und Völkerverständigung gedient werden soll.

Der Bund (LEA/G) lehnt jegliche Diktatur ab und sieht in der Entwicklung der Völker zu einer demokratischen, humanitären, freiheitlichen und sozialen Gesellschaft die Basis für seine Betätigung. Es wird vierteljährlich das Bundesorgan LEA/G-MAGAZINO herausgegeben, dessen zweisprachiger Inhalt informiert und einen Esperanto-Lehrgang bietet.

Die Aufgaben werden mit den von den Mitgliedern und Förderern gezahlten Jahresbeiträgen (1996: 15,- DM) und Spenden finanziert. Aktives Mitglied kann jeder werden, der die Bundessatzung anerkennt; passive Mitglieder können Personen und Organisationen werden, die den Gedanken der Völkerverständigung fördern und den Bund (LEA/G) ideell und finanziell unterstützen. Der demokratisch gewählte Vorstand (5 Mitglieder) führt in Übereinstimmung mit Beratern die laufenden Geschäfte. Der 1. Vorsitzende vertritt den Bund nach innen und außen. Weitere Informationen auch über S.A.T., Gruppe Deutschland, erhalten Sie bei:

Freier Esperanto-Bund, Renchener Str. 47, D-77704 Oberkirch (Baden)



Retadreso (E-mail) de SAT:  
sat-esp@worldnet.net

SAT sur TTT:  
<http://www.worldnet.net/~sat-esp/>



## Perspektivo

Vi petas de mi profetaĵon pri la estontaj 50 jaroj? Kaj tion en la kriza momento de la Esperanto-movado! Neeble estas kontentigi vin.

Certe, la ideo de Esperantismo estas grandioza kaj posedas la plej bonajn ŝancojn venki definitive, eĉ pli vaste ol iu el ni kuraĝis publike eldiri. Sed ĉu tio postulos kvindek jarojn aŭ kelkajn jarcentojn, tio dependas ne de Esperantismo, sed de la esperantistoj. Kaj ni esperantistoj estas malvastanimaj, enviemaj, ofendiĝemaj, al ni mankas oferemo kaj sinforĝeso. Kaj se inter ni troviĝas gvidantoj, en kiuj loĝas genio, ni forĵetas ilin.

Pro tio la proksima estonteco de Esperantismo ne aspektas luma. Ŝajnas, ke ankoraŭ dum jaroj daŭrados la nuna situacio: ĝi ĉiam varbadas novajn adeptojn kaj perdas proksimume saman nombron da malnovaj. Ni babilados (bone, se ĉiam en Esperanto), ekskursados, aranĝos festetojn... iuj el ni ankaŭ iam kaj tiam legos kaj eĉ aĉetos novan esperantan verkon, eĉ estos inter ni stranguloj, kiuj verkos aŭ tradukos tiajn kaj eĉ presos ilin... sed la veraj sukcesoj lasos atendi sin ĝis... Nu, tio dependas de la esperantistoj.

La esperon ni ne bezonas forĵeti. La poeto Eino Leino iam profete montris la senliman potencon de la idealo. Se ĝia portanto forgesa ĝin, la idealo forlasas lin kaj serĉas novan, pli indan portanton. Kaj venkas.


Jen la perspektivo de Esperanto — antaŭ miaj okuloj.

Vilho Setälä

en 1937 pri la jarkvindeko 1937 — 1987

el la Ora Libro 1887 — 1937.

Ĉu valida ankaŭ por 1987 — 2037? KHK



La danĝera kulo ne flugas dum la tago. Ĝi venas dum la nokto. Kaj ĝi ne nur flugas, ĝi ankaŭ zumas kaj... pikas. Ĝi suĉas la sangon.



## Karbo por arto Arto por karbo



La vintro 1946/47 estis severa. La laboro ĉe la tri ŝtataj teatroj en Hamburg estis grave endanĝerita.

Mankis karbo por hejti. Sed la karbominlaboristoj el Recklinghausen sentis sin solidaraj kun la Hamburgaj geaktoroj. Ili prenis sur sin la riskon por transporti la karbon al Hamburg, ĉar por la tiama brita okupadpotenco, tia sendaĵo ne estis vivnecesa. Tamen la helpopreteco de la karboministoj impresis la geaktorojn. Dum la venonta somero ili esprimis sian dankon per tio, ke ili prezentis spektaklon en Recklinghausen. Kio komencis sub ekstremaj kondiĉoj de la postmilita tempo sub la devizo „Vi por ni kaj ni por vi“ fariĝis la hodiaŭaj Ruhrfestspiele (Rur-festivaloj). En ĉi tiu jaro oni festas la 50-an naskiĝjaron. Intertempe ĝi fariĝis Eŭropa Festivalo kun 18 produktadoj el multaj Eŭropaj landoj. La ĉijara devizo estas: „Arto estas la motoro de ĉiu kulturo“.

KHK

MAGAZINO konigas sortojn de laboristaj esperantistoj:

### Dresdena taglibro

La romanisto Victor Klemperer notis en sian taglibron sub la dato 19-a de aŭgusto, 1945:

'Hieraŭ mi estis malfrue je 18.30 h en mia loĝejo. Venis (Erich) Seidemann (la nova grupestro de la KPD) 37j., kviefa k. energia naturo, prezentanta certan rigorecon kaj koncizon. Oni perceptas, ke li estas sentimentala certsence, pripensada, idealisma, sperta, memedukita. - Preskaŭ seninterrompe li estis antaŭ la milito kaj dum milito en pundomo kaj koncentrejo. Sia edukado: Popolmejo, aŭtodidakto, idealisto, serĉanto, entusiasmulo, ne fanatikisto, ĉiam sclavida. Nuntempe li demandis pri edukado kiel instruisto. Mi jam konceptis antaŭ kelka tempo, kiam li parolis enkondukajn vortojn pri Heine (Heinrich, fama poeto el Dusseldorf), kiel pripensema kaj vercerĉanta li (Seidemann) estas. Ne ekzistas malklaraj konturoj, eksterajoj. Tiu homo ne estas komplika, sen obstino kaj, mi opinias, li estas aŭtentika, vera.'

(trad. Stefano)

Sanecsubtenantaj konsiloj!

## Salo

Ĉi-tie iom pri la utilo de la kuirsalto.

- Plej ofte oni uzas salon kiel kondimento (*Würzmittel*). Krom tio ĝi havas aliajn utilojn en la ĉiutaga vivo.

Kiu suferas je konstipo (*Stuhlverstopfung*) trinku salakvon matene.

- Te-akvo kun salo estas utila por kvietigi soifon kaj kuraci laringiton (*Halsentzündung*).

Kiu ŝvitas tro abunde dum somero, trinku salakvon. Ĝi helpas en la prevento de sunfrapo.

Oni atentu ke ĉiutage oni prenu ne pli ol 5 gramojn da salo, ĉar pli da salo malutilas al la sano.

Suferantoj de konjunktivito (*Bindehautentzündung*) lavu la okulojn per salakvo.

Kiu suferas de dermatozo (*Hautkrankheit*) banu sin en salakvo.

KHK

*Der sanfte Tourismus  
FREUNDE DER NATUR  
TOURISTIK  
UMWELTSCHUTZ*

\*\*\*\*\*

TANEF-organo  
LA MIGRANTO  
Cefred.

Antje Nordewier-  
Jagtenberg

Kon. Emmalaan 7  
NL-3832 AH Leusden

\*\*\*\*\*

*Se vi estas malkontenta pri  
LEA/G MAGAZINO  
diru tion al ni!*

*Se vi estas kontenta pri  
LEA/G MAGAZINO  
diru tion al aliaj!*



## Kiu - se ne ni mem?

### Konsilo (alvoko) al esperantistoj

Se vi vojaĝas al eksterlando, kaj necesas trovi komunan lingvon kun fremdulo, nepre kaj ofte uzu la esprimon: „Ĉu vi parolas esperante?“ — kaj ne komencu per „Do you speak english?“

Unue demandu ĉu oni komprenas nian lingvon, kaj nur poste demandu por aliaj lingvoj!

Eĉ se vi scias, ke oni ne komprenas la neŭtralan Internacian Lingvon, demandu! Gravus, ke oni demandadu, t.e. postulu uzon de Esperanto!

Se ni, esperantistoj, mem ne fieras, kaj ne uzas la esprimon: „Ĉu vi parolas esperante“, kiu ja uzos ĝin?

Se multaj homoj demandas por Esperanto, la oficistoj devos ion fari . . . Aparte ĉe stacidomoj kaj aliaj trafikdomoj' dise de mondo.

Do: „Ĉu vi parolas esperante?“

Zoran Ĉiriĉ

el Eventoj n-ro 99 KHK

### ESPERANTISTOJ VIZITIS ALSACON

Vera printempa vetero zorgis por ne-forgesebla ekskurso de l'Esperanto-Grupo Oberkirch per kvin aŭtomobiloj. Inter la dekkvar esperantistoj kvar LEA/G-anoj, tiel la eminentulo Walter Poppeck. Lia komunikado pri la okazaĵo aperis en loka gazeto.

Post komuna elstara tagmeza manĝado en gastejo 'Engel' proksime de Bühl l'aŭtomobilistoj direktiĝis al la celo en Alsaco. Odette Scheidel en Betschdorf, organiza-talento de SAT-Amikaro organizis rendezuon inter francaj esperantistoj el la regiono kaj la ĉiam bonvenaj Oberkirch-anoj. Ŝi gvidis la rendezuanojn tra Betschdorf, kie ekzistas ĉirkaŭbarajo por cikonioj, kaj ebligis viziti potfaradon kaj ĉi-tilatan muzeon, kie oni povas admiri interesajn potaĵojn el Alsaco kaj Rejnlando. Potfaristo Koger estas unu el la Betschdorfaj potfaristoj, kiu ankoraŭ verkas sur tom-disko per mano. Tiuj potfaristoj estas artistoj en sia metio kaj la solaj en tut-Franco.

Post vespermanĝo, klun Odette prezentis per membakitaj pano kaj kuko, je la sepa vespere prezidanto Heiß de la Oberkirch-grupo dankis Odette kaj l'aliajn por la amikeca akcepto kaj esprimis la grupan esperon, ke ankaŭ esperantistoj el Betschdorf partoprenos la jubileajn okazaĵojn en junio en Oberkirch.

AFS

Für den Anfänger: elstara - außergewöhnlich;  
direktiĝis - wandten sich (die Autofahrer)  
ĉirkaŭbarajo - Gehege; cikonioj - Störche;  
pot-farado - Töpferel; tom-disko - Drehscheibe

## Sciindaĵoj

### Cu iam venos respondo?

La usona mondspace instanco NASA kredas pri ekzisto de inteligentaj estaĵoj en aliaj sunosistemoj. Por fizika kontakto la distancoj estas tro grandaj. La unusola ebleco estus kontakto per radio. Jam antaŭ 50 jaroj oni sendis de el la tero radiosignalojn en la universon, sed ĝis hodiaŭ oni ne povis ricevi respondon. Tio tamen ne estas pruvo kontraŭ la ekzistado de civilizitaj eksterteraj vivestaĵoj. Multe pli maljuna civilizacio sur iu ajn planedo eble jam estis provinta interkontakti, sed povas esti, ke inter la dek miliardoj da kanaloj ni ankoraŭ ne trovis la ĝustan.

### Kial la akvo estas malseka?

Kvankam multaj substancoj estas fluidaj, ni ne sentas ĉiujn kiel malsekajn. Tiun impreson estigas nur akvo kaj fluidaĵoj enhavantaj akvon. Ili posedas la kapablon, tute etendiĝi super surfacon, ili malsekigas ĝin. Se akvo vaporiga, ĝi ne plu estas fluida, sed gasforma. La akvomolekuloj estas pli disaj. En la fluidaĵo ili ligiĝas reciproke. Por ĉesigi tiun ligojn, akvo bezonas altan kvanton da varmecenergio. Akvo ne vaporiga rapide. Tiujn du ecojn ni sentas kiel malsekajn.

### La rivero Zambesio

La Zambesio-rivero estas la plej granda rivero en Sud-Afriko kaj fontas en Angolo en

alteco de 1200 metroj. Ĝi havas longecon de 2660 kilometroj kaj fluas ĉe Chinde en la Hindan Oceanon. Antaŭ la valbaraĵo de la grandelektrejo de Kariba, kiu havas gravan signifon por la ekonomia evoluo de Simbabvo, la Zambesio-rivero formas lagon kun longeco de 300 kilometroj. La supra parto de la rivero estas nur malmulte esplorita. En la proksimeco de la urbo Zumbo vivas membroj de la Vadomas-tribo, kiujn oni ankoraŭ ne povis observi pli profunde. Oni nur scias, ke ili havas je la piedoj anstataŭ kvin nur du fingrojn, sed tre fortajn.

### Kolego roboto

El la modernaj fabrikhaloj la „kolego“ roboto ne plu estas forpensebla. Veldado, ŝraŭbado, muntado — tio estas la laboroj de la komputile direktitaj maŝinoj. Pli ol 600.000 industri-robotoj ekzistas en la mondo. La duono de ili staras en japanaj fabrikoj. Rilate al po 10.000 industrilaboristoj tie 338 robotoj estas funkciantaj. Duvice sekvas — mezurite je la roboto-denceco — Singapuro kun 112 ekzempleroj. Germanio havas 69 robotoj po 10.000 industrilaboristoj. La venkiro de la roboto daŭras ankaŭ en la venontaj jaroj. Ĝis fino de la jaro 1998 fakuloj atendas la utiligon de pli ol 800.000 industrirobotoj en la mondo.

Elgermanigis: **F. W. Poppeck**  
 Fonto: Kalendarfolioj

### INFORMOJ

**ESPERANTO-GRUPO OBERKIRCH** festos sian 40jaran jubileon sabaton, 22.06. 20 h en ŝalono de evang. paroĥo Appenweierer strato 2a. Partoprenos i.a. delegacio el Gray/Francio, Kultura programo, muzikos ge-esp-istoj Rössler.

Ino **KOLBE**, Leipzig, verkis kaj eldonis 'Zur Geschichte des Arbeiter-Esperanto Bundes...' Valorinda kompletigo al: Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado (Hüser-Institut)

Germana LEA agas ĉi-jare 40 jarojn. La asocio estas fondita paskon 1956. Pri la historio sekvas artikolo en la venonta MAGAZINO (n°16 - okt.1996).

### NEKROLOGO

La 16.02. 6j. mortis en Bad Homburg nia amiko kaj fidela membro, 86-jara, **Leonhard P U F F**. Li estis unu de la fondintoj de LEA/G (en 1956), kies konsiloj estis satataj. Ni kondolencas al la familianoj.

Mortis 09.03. 6j. en Stuttgart nia fide-la amiko, 88-jara, **Alfred von der HEID**. Ankaŭ li apartenis al la grupo de fonditoj de LEA/G kaj multaj jaroj redaktis nian organon, kiu nomis sisteme **La libera Esperantisto**. Ni kondolencas al la familianoj.

## Kiel lerni

### Verda Majo

t.e. Hasegawa Teru 1912 — 1947

Iu fervora esperantisto riproĉis sian filon, kiu neniam progresis en Esperanto. Tiam la knabo respondis:

— Paĉjo, lasu min vojaĝi al Esperantio, tiam mi baldaŭ povos paroli Esperante multe pli bone ol vi.

Jes, malfacilo de Esperanto-lernado kuŝas ĉi tie, ke Esperanto ne havas sian landon, al ĝi mankas bazo de reala ĉiutaga vivo, kaj ni ne povas trovi esperantistojn en senco de ĉinoj, angloj, rusoj k.t.p. Tamen aliflanke ĝuste pro tio ĝi estas facile lernebla. Supozu, ke vi lernas la anglan lingvon. Eĉ se vi eluzus tempon de dek jaroj kaj monon de dekmil dolaroj, vi ne povus paroli en ĝi tiel flue kiel almozulo sur strato de Londono.

Praktiko de lingvo ĝenerale havas kvar flankojn: paroli, aŭdi, legi kaj skribi. Sed por pliparto el niaj legantoj, tute izolitaj disde samideanoj, ne estus interesa la temo pri parolo kaj aŭdo, kaj aldone la nuna situacio de l' internacia helpa lingvo postulas de ni pli diligentajn je la lastaj du ol je la unuaj.

Esperantajn presaĵojn vi legu laŭeble multe, vaste, profunde kaj ripete. Ni precipe rekomendas al vi la originalojn kaj tradukojn de Zamenhof, ĉar li estas ne nur kreanto de l' lingvo, sed ankaŭ unu el la plej superaj stilistoj de Esperanto-literaturo. Mallongajn, de vi ŝatatajn artikolojn vi ĉiutage voĉlegu kaj eĉ parkerigi, kio ne estas ridinda malnova ĉina maniero, sed ja tre necesa por lernado de fremda lingvo. Tio helpas vin poste, kiam vi havos ŝancon interparoli kun kamarado.

Skribon ni devas lerni unue per taglibro, korespondo kaj per mallonga traduko. Nepre forjetu malbonan kutimon, nome sur papero vi skribas Esperante, tamen antaŭe en la cerbo vi ĝin tradukis el la ĉina lingvo. Tiel vi ofte faras strangajn erarojn, ekzemple, „Ĉu vi estas bona?“ „Mi ne manĝas vinon.“ anstataŭ „Ĉu vi fartas bone?“ „Mi ne trinkas vinon.“ k.t.p. Kutimiĝu al la rekta skribo. Poste vi povas enkonduki bonajn kaj por alilandanoj kompreneblajn esprimmanierojn de la ĉina lingvo. Esperanto devas pli riĉiĝi, kaj tio ne estas atingebla sen peno de ni aziaj esperantistoj.

Lernado de Esperanto devas esti kunigita kun ĝia praktiko. La anglan lingvon vi povus lerni nur pro devigo flanke de lernejo, la francan pro via gusto al ĝia literaturo, kaj la rusan pro „modo“. Sed Esperanto-lernado estas sensenca kaj neperfekta, se vi ne partoprenas ĝian movadon enlandan kaj poste internacian. Lernu kaj dume praktiku!

Jen estas nia slogano.

(El *Lernilo de Esperanto* n-ro 4; apr. 1943)

KHK

*Für den Anfänger:*

*fervora - eifrig; riproĉis - rügte;  
aliflanke - andrerseits; supozi -  
voraussetzen; presaĵoj - Drucksachen;  
vasta - umfassend, umfangreich;  
profunda - tief; parkerigi - auswendig  
lernen; kutimiĝi - sich gewöhnen;  
esprimmaniero - Ausdrucksweise;  
riĉiĝi - reich werden; modo - Mode  
(was gerade üblich ist); dume - unter-  
dessen.*

## MAGAZINO SKRIBITA

per komputilo - literipo: Esperanto Arial

> Ĝi aperas ĉiun kvaran jaron komence de Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro;

> praktikas la internacian lingvon ESPERANTO de ĉiutaga vivo, aperigas Esperanto-kurson, interesajn artikolojn parte skribita de l'membroj mem kaj helpas al lingvo-komencantoj kompreni tekstojn. La gazeto informas pri asociaj okazaĵoj kaj aktivecoj.

> abonprezo 1996/1997: 15,- DM aŭ 8 IRK

> LEAG (Libera Esperanto-Asocio) eldonanto de MAGAZINO, kiu subtenis finance k. vendas: >>Ilustrita historio de la Laborista Esperanto-Movado - *Illustr.Geschichte der Arbeiter-Esperantobewegung* - 115-paĝa broŝuro, en Esperanto/deutsch, 10,- DM aŭ 6 IRK;

>>8 bildpoŝtkartoj en koverto pri kultur-historio de la Esperanto-movado, 8,- DM aŭ 5 IRK;

>>Skize pri Esperanto-teatro de Banet-Fomalova, broŝuro, 90-paĝ., 8,- DM aŭ 5 IRK;

>>verkoj de H.Jankowski pri Esperanto-mono kaj -medaloj, po 5,- DM aŭ 3 IRK.

> ĉiuj havebla ĉe MAGAZINO-redakcio.

> LEAG-kotizoj 1996: 15,- DM

> pri detaloj informas: A.Stephan  
Renchener Str.47, D-77704 Oberkirch (Baden)



## Leteroj de legant(in)oj

Temo: Ĉu nacilingvaj artikoloj estu presataj en gazetoj/organoj de esperantistaj asocioj?

Letero (aprilo 1996) de Alan Gould (SATEB) redaktoro de 'La verda proleto':

"... Mi dankas pro la aperigo de diskuto sub la kapitulo de Informpeto en LEA/G-MAGAZINO n-ro 14 2/96. Samtempe mi gratulas ... pri la alta nivelo-kaj daŭrada intereseco de tiu gazeto. - Scilgu ke Krys Ungar kaj mi longe interdiskutadas tiun aferon pri uzo de naciaj lingvoj por kaj rilate al Esperantaj celoj. Krys kaj mi (restas ... Esp-aj kunlaborantoj, ni tamen tute kaj nenulgeble malkonsentas pri tiu afero.

La SATEB bulteno, de kreiĝo en 1925 aŭ frue, ĝis la morto de Ethel Prent (lama redaktorino - la red.) vintre 1992, uzis anglalingvan fronto paĝon. Mi lasttempe eldonis specialan festan bultenon por celebri n° 400, kiu elmontras tiun fakton. La redaktoreco transpasis unue al Paul Gubbins, poste li kaj mi kune laboris, fine al mi ĉe la SATEB Jarkunveno de 1994. ... Krys opinias ke nia bulteno devus uzi sole Esperanton kaj la plejmulto de la ĉeestantoj ne malkonsentas kun ŝi pri tio: ... Krys postulis al mi 'Ne unu vorto de angla lingvo'. Mi protestis ... ke laŭ tia regulo mi ne eĉ povus presigi mian propran nomon ... mi estas Alan Gould kaj ne Alano Guldo (...). Mi tamen akceptis la decidon de la Jarkunveno kaj uzis ... sole Esperanton dum la sekvanta jaro inkluzive sur la fronto paĝo. Tiu agado montrigis nepopulara Inter SATEBanoj, ... ili do ŝanĝis la decidon dum la 1995 SATEB Jarkunveno, ...

Gazetoj kiel MAGAZINO kaj LA VERDA PROLETO servas al diversaj celoj ... redaktoroj devas atenti al tiuj bone laŭebla. ... tutprave ke transnaciaj aŭ tutmondaj gazetoj kiel SENNACIULO, ESPERANTO ktp. devas uzi nur nian karan lingvon. LEA-gazetoj estas landaj informiloj kaj respondecas pri varbado de novaj membroj, prezentas Esp-on al ne-esperantistoj ktp., servas al komencantoj, progresantoj kaj spertuloj samtempe. ... difekton venas al Esperanto pro insuleco kaj ekskluziveco. ..."

Redakcia respondo: Dankon, kara kamarado Alan, por via kontribuo al la temo. Ne ĉagrenu, ke ni mallongigis vian verkon pro manko de spaco.

AFS

Sendis bildpoŝtkarton 'La forto de la aĝo' aprilo 1996 k-do Erwin A. Feder, Duisbürg:

"... mi gratulas ke vi ne plu presas la horoskopon. Tjun sensensaĵon oni povas vidi en ĉiu ĝardenista ĵurnalo sub la titolo 'sterko' (germanlingve: Dünger aŭ Mist - la red.) - La artikolo en n° 14, p.3 'Intereso' estas laika. El famila fonto mi scias pli taŭgan. ..."

Redakcia respondo: Ni konstataas, ke vi, kara Erwin, intensive tra legis vian/nian MAGAZINO-n. Dankon. Pri la temo ni atentigas al letero de Friedel Bues.

AS

Skribis Lothar Nussbaum, Köln: 'La konceman artikolon en MAGAZINO 14 (1996) mi legis kun granda intereso kaj dezirus skribi mian opinion je tiu temo. Ankoraŭ bone mi rememoras al la tempo antaŭ preskaŭ 50 jaroj. En mia hejmurbo Kiel mi partoprenis Esperanto-kurson kaj poste aliĝis al la Esperanto-grupo Kiel. Tie nur estis membroj kiuj flue sciis paroli la lingvon kaj sekve oni parolis sole Esperanton. Komence tio lomete ĝenis min, sed oni helpis al mi kaj mi lernis rapide paroli same flue. En alia loko mi partoprenis kunvenojn kaj tie oni (nur) salutis kaj adiaŭis sin per Esperanto, sed la parolita lingvo estis la germana. Oni faris tion ĉar ĉiam partoprenis "Bonan-tagon-esperantistoj" kiuj ne 'povis' partopreni, se oni parolis Esperanton. Tio min ofte ĝenis kaj fine mi rezignis kaj ne plu partoprenis la kunvenojn.

Kiam mi volas varbi por lingva projekto kiel nia Esperanto mi devas uzi la lingvon konsekvence. La lokaj grupoj ne estas sufiĉe grandaj por partigi ilin en grupoj kie oni parolas nur Esperanton kaj nur nacilingve. Sed mi opinias, ke tiuj "eternaj komencantoj", kiuj neniam lernas ion alian ol 'Bonan tagon', ĝis revido' pli malhelpas la aferon, ili malpravigas ĉiujn argumentojn pri facileco kaj taŭgeco de Esperanto kiel lingvo por ĉiuj partoj de la vivo.

Alia demando estas, ĉu la MAGAZINO estu varbilo aŭ ĉu ĝi servu kiel informilo por la membroj? Mi pensas, ke nia plej efika varbilo estas nia lingvo Esperanto! L medioj, gazetoj, radio, televido ktp. estas taŭgaj helpiloj por montri kaj pruvigi, ke Esperanto estas multe pli ol nur lingvo por paroli dum grupaj kunvenoj kaj kongresoj. Mi persone preferus MAGAZINO-n sole skribita en Esperanto. Tion ne signifas kritikon kontraŭ la enhavo kaj dullingveco de la MAGAZINO sed nur montras mian preferon por Esperanto. ..."

Letero de Fr. Bues, Hanovro, (19.03.96) pri horoskopoj en MAGAZINO 13:

"Kun granda intereso mi legis en Magazino 13 1/96 la leteron de k-do. S. Linke per kio li kritikis la enhavon de 'Magazino'. Ĉefe temis pri la 'horoskopoj', kiujn ankaŭ jam K.H. Kersting kritikis absolute ĝuste per la artikolo 'Kontraŭdiro' en Magazino 12/95. Aliflanke mi ankaŭ subtenas la kritikon de k-do. Linke rilate la mallongigoj aŭ sigloj KHK aŭ AFS. Mi estas certa, ke ĉiu leganto scias, kiu sin kaŝas per ili.

La rimarkon de la redaktoro (A.F. Stephan), ke ni estus feliĉaj, se ni havus tiom da legantoj kiel la bulvardaj ĵurnaloj, mi absolute povas jes, sed se tio okazus sub la kondiĉo, ke MAGAZINO similus laŭ enhavo ankaŭ tiujn bulvardajn ĵurnalojn, tiam mi preferus havi pli malmulte da legantoj...."

Redakcia respondo: Pri horoskopo resp. astrologio mi skribis nur klarigojn, je kiuj legant(in)oj povas kredi laŭplaĉe. Mi konas sinjorinojn, kiuj ekzemple aĉetas 'Bild' (bulvardgazeto) nur por 'studi' la tagan horoskopon, tamen ili certe povas takeli, ke ne estas ebla, ke samtempe milionojn da homoj 'trafas' la sama sorto aŭ feliĉo.

Temas pri enhavo de MAGAZINO n°14.

Lingva angulo - Sprachecke

Nia aktivulo en Berlino Will Firth skribis i.a. "N-ro 14 estas ĉom pli socie/politike relevanta ol la antaŭa n-ro, sed laŭ mia opinio ĝi tutsimple foras de la aktualaj sociaj luktoj ĉi-landaj kaj tutmondaj. Ĉu kialas tendencaj, generaciaj aŭ personaj kaŭzoj - mi ne povas diveni. ... Mi preferus investi la abonsumon en alla projekto. Se ektemos pri kontribuajoj, vi libere povas ĉerpi ion-ajn el FAŬ-GISDATIGO, klun mi kiel fidela SATano daŭre alsendos. ...Kritike kaj kamaradece Volo."

Respondo de redakcio: Kara Volo, propradire devas aperi en MAGAZINO nur informoj pri okazaĵoj el LEA/G-vivo, se eble el la esperanta mondo, lingva kurso ktp. Tio estas tro senvigla kaj ni aperigas ĉi ankau ĉiujn ajn artikolojn, verkojn, rakontojn, se ni ricevis materialon bedaŭrinde tre malofte. Pri ĉiu kontribuo ni devas konsideri, ĉu la temo ne pli bone laŭgas por SENNACIULO aŭ ĉu la SAT-organo jam skribis pri ĝi. Ĉu generacia kaŭzo? Jes, junuloj ne emas transpreni respondecon pri verki gazeton! - AFS

### Nacilingvaj artikoloj en MAGAZINO

*Sajnas, ke la plimulto de la legantaro preferas unualinie Esperanto-lingvajn tekstojn en la LEA/G-organo. Ĝis nun aperis nur ĉa. 20% germanlingvaj kontribuoj kaj mi opinias, ke tio ne damaĝas la internacian lingvon. Tamen, karaj legantoj, mi prezentas al vi alian proponon kiel fari nian organon:*

*La frontpaĝa artikolo kaj asociaj informoj estu du-lingvaj por ke ĉiu membro ĉu parolas Esperanto-n ĉu ne estu informata. Sur la lasta paĝo aperu kontinue lingva angulo (Sprachecke) en germana lingvo kaj/aŭ pritrakto de lingvaj problemoj skribata en ambaŭ lingvoj.*

*Sur la aliaj paĝoj ni aperigos Esperant-lingvajn tekstojn kun piednotoj per kiuj ni liverados tradukojn de special-kaj malofte uzataj vortoj. Poemoj, leteroj de legantoj k.a. aperos en la lingvo internacia.*

*Ni esperas, ke ni per tiu metodo kontentigos ĉiun legant(in)on.*

*Stephan (respond.redaktanto)*

**Malgraŭ** - Man begegnet häufig Bildungen wie 'edziĝo malgraŭvola' und 'kuracisto malgraŭvola', selbst in maßgebenden Esperanto-Lehrwerken. Diese malgraŭ-Anwendungen dürften nicht korrekt sein. Ein-deutlig und klar wäre in o.a. Beispielen 'kontraŭvola'.

Malgraŭ heißt 'ungeachtet, trotz' und kontraŭ 'gegen, wider'. Ein kuracisto kontraŭvola ist also ein Arzt 'wider Willen', ein Mensch, der den Arztberuf gar nicht ergreifen wollte. Die Wortbildung kuracisto malgraŭvola ist zumindest doppelsinnig, denn sie besagt, daß der Betreffende trotz seines Willens Arzt zu werden, Arzt wurde. Das ist ohne Sinn! Malgraŭ lia volo... malgraŭ ke (kvankam) li volis. Er wollte aber nicht, also malgraŭ ke (kvankam) li ne volis... kontraŭ lia volo. In malgraŭ liegt kein Verneinungsbegriff z.B. li eliris malgraŭ la pluvo ... kvankam pluvis, und nicht etwa kvankam ne pluvis.

Die Unklarheit entstand wohl dadurch, daß Dr.Zamenhof durch das Französische beeinflusst, nebeneinander malgraŭvola und kontraŭvola in der gleichen Bedeutung gebraucht hat. Nationalsprachen können sich Freiheiten erlauben, die im Esperanto nur bedingt angebracht sind. Sie wirken oft verwässernd und verwirrend in ihrem logischen Bau, da in der lingvo Internacia äusserste Klarheit oberster Grundsatz bleiben muß.

(de M.Butin - tradukis: nekonata)

Profesoro d-ro Edmond Privat diris: 'Multo dependos de tio, kion elektos la esperantistoj kiel celo de sia agado: ĉu senĉesa batalo pri organizaj problemoj absolute bagatelaj rilate al tutmondo, ĉu inteligenta uzo de Esperanto por utilaj servoj al la homaro.'

\* \* \*

Dum siaj lastaj vivmomentoj fama kuracisto estis ĉirkaŭata de pluraj el la plej eminentaj kuracistoj, kiuj ĉiuj konkuris per esprimoj pri lia bedaŭrinda situacio. „Sinjoroj, li subite diris, „ne tro kompatu min. Mi postlasas tri grandajn kuracistojn.“ Kiam ili petegis lin, nomi ilin – ĉiu el ili esperis, ke lia nomo estos inter la tri – li mallonge diris: „Akvo, ekzercado kaj dieto.“



## 69-A KONGRESO DE SAT -

SANKT-PETERBURGO

1996-07-13/20

O.K.K.: Sankt-Peterburga Esperanto-Asocio, a/k 348, RU-190000 Sankt-Peterburgo. Telefono : +7.812.217.40.52.(vespere inter 20h00-24h00)

Telekopiilo: +7.812.151.00.80 INTERNET : memo@vitatur.spb.st

Prezidantino : Ludmila TITOVA

Sekretariino : Serafima GORNOSTAEVA



## Pri la neceso paroli Esperanton

Vi eble miros, ke mi parolas al vi ne ruse, sed esperante; vi eble diros, ke ĉar ni havas nun kongreson de samregnanoj kaj ĉiuj, aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj komprenas tre bone la saman lingvon, estas multe pli nature paroli al ili en tiu lingvo. Ekzistas tamen gravaj kaŭzoj, pro kiuj mi elektis por mia parolo tiun lingvon, por kiu ni batalas kaj por kiu ni kunvenis.

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukatan. Esperantistoj, disĵetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj, kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian popran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Kiam ili poste revenas hejmen, ili ne sole mem parolas pli pure, sed ili alportas modelon de bona parolado al tiuj, kiuj restis hejme. Tiamaniere la kongresoj reguligas la uzadon de la lingvo, kaj dank' al niaj kongresoj jam nun oni parolas Esperanton perfekte egale ne sole en la plej malproksimaj anguloj de ĉiu aparta regno, sed en ĉiuj plej malsamaj lokoj de la tuta tera globo. Jam nun, kiam oni aŭdas bonan kaj spertan esperantan oratoron, oni neniel povas diveni, al kiu nacio aŭ lando li apartenas. La plena aŭtonomia vivo de nia lingvo, kun ĝia absolute popra, ne pruntita kaj ne imitita spirito, ĉiam pli kaj pli fortikiĝas tiamaniere, kvazaŭ ĉiuj esperantistoj de la mondo, loĝus

### Famuloj en Ruslando

La famekonata angla organisto Bridge iam kun sia amiko, la romanverkisto Player, estis en Ruslando. Ili vizitis Moskvon rigardis muzeojn kaj monumentojn en tiu ĉi historia urbo. Pro la multaj vidindaĵoj, kiujn ili renkontis, la amikoj preskaŭ ne atentis la jam malfruan horon. Bridge ektimis je la penso, ke ankoraŭ hodiaŭ li devas pluvenĵaĝi al Petroburgo por koncerti tie vespere (dum la SAT-kongreso? la red.) Bridge konstatis, ke mankas ankoraŭ 40 minutoj ĝis la ekveturo de l'trajno. Player tuis pro tio ĵus alvenantan neokupitan droŝkon, sed ho ve, estis ja lingvaj malfacilaĵoj. Sed ili havis ideon! Unu el ili fajfis kiel trajnestro fajfas je la ekveturo trajna kaj la alia imitis per la buŝo bruon similan al ekveturanta vagonaro. La koĉero miris pri la du kaj ridetis. Per mangesto li invitis ambaŭ eniri la droŝkon kaj per fortaj vipbatoj li galopigis la ĉevalon. Kredante esti survoje al stacidomo, la amikoj estis tre kontentaj.

kune sur unu malgranda peso da tero.

Ne malpli grava estas la *eduka* signifo de la esperantistaj kongresoj. Izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havis la eblon praktike apliki tion, kion ili lernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tute bone interkompreniĝi. Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝaco de la parolado aperas ankaŭ nekuraĝeco de propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li per siaj popraj oreloj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio. Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la lokaj, tiamaniere edukas konvinkitajn, sekve ankaŭ entuziasmajn batalantojn por nia afero.

Tio estas la ĉefaj motivoj, pro kiuj ni en ĉiuj niaj kongresoj ne sole en la universalaj, sed ankaŭ en la naciaj aŭ regionaj, nepre devas paroli ne sole *pri* Esperanto, sed ankaŭ *per* Esperanto.

L. L. Zamenhof

(el Parolado en St. Petersburg, 1910)

KHK

Flere ili konstatis, ke estis bona ideo, tiam rapide kaj facile kompreniĝi sin per fajfado kaj siblado. Ĉiukaze ili havus ŝancon ĝustatempe atingi la trajnon.

Sed dek minutojn pli poste la koĉero haltis la droŝkon antaŭ frenezulejo certe supozante, ke la pasaĝeroj estas spiritomalsanaj homoj.

(trad.: L. Speth - kompilis: AFS)

Ni estas ĉiam  
iomete pli rapidaj  
ol l'aliaj.  
Dum l'aliaj  
ankoraŭ falas,  
ni jam troviĝas  
sur la tero.

Wir sind immer  
ein wenig  
schneller  
als die anderen.  
Wenn die anderen  
noch fallen,  
liegen wir schon  
auf der Schnauze.

INFOJ PRI LEA/G

Estraro - ĝis pasko 1997

**Prezidanto/Vorsitzer:** Albert F. Stephan, Oberkirch  
**Anstataŭanto/Vertreter:** Margot Stephan, Oberkirch  
**Financoj/Kasse:** Karl-Heinz Kersting, Essen  
**Sekretario/Schriftführer:** vakas  
**Konsilantoj/Berater:** Friedel Bues, Hannover  
 Siegfried Linke, Halle  
 Hans Rodewig, Hannover  
**Revisoroj:** Hans Jankowski, Dortmund  
 Jhs. Meyer, Düsseldorf  
**Konflikt-Komisiono:** K.E. Paech, advokato, Löhham  
 Boris Gärtner, München

LEA/G-konto: Kersting-Sonderkonto n°416 210 - 432  
 Postbank Essen (BLZ 360 100 43)

**Asocia adreso / Bundesanschrift:** (Tel. 07802-90336)  
 RENCHENER STR. 47, D-77704 OBERKIRCH (BADEN)  
 La urbo situas / die Stadt liegt ...  
 17 KM nord-oriente/nordöstlich de Offenburg  
 30 KM same de Strasburgo/Alzaso  
 40 KM okcidente/westlich de Freudenstadt (ski-tereno)  
 191 M super la marnivelo/über dem Meeresspiegel  
 La montoj ĉirkaŭe inter/Berge ringsum zw. 600 k. 1000 M  
 En Oberkirch estas Esperantostrato!  
 Esperanto-Grupo Oberkirch e.V. estas tre aktiva kaj  
 festos ĉijare 40-jaran jubileon  
 (Honorprezidanto: W. Poppeck; Prezidanto: H. Heiss)

-- LEA/G flegas amikajn kontaktojn/pflegt freundschaftliche Kontakte kun/mit:  
 S.A.T. Amikaro (franca LEA)  
 TANEP (Naturamikoj)  
 Esperanto-Societo Düsseldorf  
 TUMONDE Pacifista Movado, Terrassa/Hispanio

-- Membroj: 77 simpatiantoj: ĉa. 12

-- LEA/G-organo MAGAZINO  
 Legantoj: 77 Germanio plus 3 abonantoj  
 Fritz-Hüser-Instituto Dortmund kolektas ĉiun eldonon  
 en Francio: 8; Australio: 1; Aŭstrio: 2  
 Belgio: 2; Brazilo: 1; Hispanio: 3; Hungario: 1  
 Nederlando: 2; Portugalio: 1; Svisio: 1.  
 Interŝanĝe/im Austausch: Laute, E-Liga Berlin,  
 INDE-organo, MALLONGE, Verda Proleto, SLEA-info,  
 SAT-Amikaro, Itala Lab.E-Asocio,  
 Liveras al/liefert an: Muzeoj en Vieno k. Gray;  
 O R F, Radio Pekino, Radio Polonia

## ❖ Premia konkurso ❖

Kiu povas korekte respondi al la sekvontaj demandoj, tiu gajnos Esperanto-libron!

1. Kiam kaj kie naskigis nia majstro?
2. En kiu jaro Zamenhof eldonis la Unua-n Libro-n?
3. Ĉu ekzistas Esperanto-mono? Kiu nomo?
4. En kiu jaro 'naskigis' SAT?
5. Kiu kreis SAT?

Bv. sendi viajn respondojn sur poŝtkarto aŭ perletere al: Libera Esperanto-Asocio  
 RENCHENER STR. 47  
 D-77704 Oberkirch (Baden)

Estos premiataj kvar kaj kvin korektaj respondoj.

❖❖❖❖❖❖❖❖❖❖



## Esperanto-Bücher-Dienste

- 1: Consuelo FÜHRER  
Am Stadtpfad 11  
D-65760 Eschborn
- 2: Rolf BEAU  
Jacobstr. 9  
D-04105 Leipzig

Aĉerintoj/Impressum  
 Eldonanto/ Herausgeber:  
 Libera Esperanto-Asocio en Germanio  
 Freier Esperanto-Bund in Deutschland  
 RENCHENER STR. 47 D-77704 OBERKIRCH  
 Tel. (0)7802-90336  
 Resp./Verantw. Albert Stephan  
 Kunlaborantoj/Mitarbeiter:  
 K.H. Kersting, Essen; Margot Stephan,  
 Oberkirch; Hans Rodewig Hannover  
 Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj  
 Redakcio havas la rajton mallongigi aŭ  
 alsendojn.  
 MAGAZINO aperas kvarfoje jare;  
 abono 15.- DM jare. Membrotitolo en-  
 tenas liveradon de l'organo.  
 LEA/G-konto: Sonderkonto Kersting  
 n° 416 210-432 Postbank Essen  
 (BLZ 360 100 43)